9-a JARO, N-o 408 MONATA ESPERANTO-GAZETO 25. AŬGUSTO 1933

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris 12e. — SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO K ADMINISTREJO: 23, rue Boyer, Paris 20e

La signifo de la esperantista laborista movado k la rolo de S. A. T.

Kvankam ĉi tiu parolado de K-do E. Lanti rilatas ĉefe al sveda publiko, ni tamen estas certaj, ke niaj legantoj legos ĝin kun intereso k eĉ povos ĉerpi el ĝi argumentojn por sia propagando. Tial ni komencas ties publikigon en ĉi tiu n-ro laŭ peto de pluraj K-doj.

Red.

Estimataj Sinjorinoj k Sinjoroj, karaj Gekamaradoj !

La organiza Komitato de la XIII-a Kongreso de *Sennacieca Asocio Tutmonda* komisiis al mi la taskon klarigi antaŭ sveda publiko la signifon k la rolon de nia movado. Mi volonte akceptis fari tian servon, sed kun la supozo, ke vi ne atendas ian sciencoplenan, metafizike nebulan traktadon pri artefarita lingvo. Cetere, ne estante lingvisto, mankas al mi la necesa aŭtoritato por tion fari. Plie, mi tuj diros al vi tute malkaŝe k senĝene, ke teoriaĵoj pri eblo aŭ neeblo krei k vivantigi lingvon, ŝajnas al mi absolute senvaloraj.

Pri tiu temo estis skribitaj multe da verkoj. Aŭtoritataj profesoroj neis ; aliaj, ne malpli eminentaj, jesis k de tio rezultis nenio certa k pozitiva. Pli konvinka ol ĉio ŝajnas al mi la simpla, tuj *konstatebla fakto*, ke mi nun staras antaŭ vi, estimataj ĉeestantoj, k paroladas en *artefarita* lingvo. Kaj estas ankaŭ kontrolebla, se ne tuj konstatebla *fakto*, ke relative multaj el la aŭskultantoj ĉi tie sidantaj min bone komprenas. Ankaŭ same bone komprenus la malproksimaj esperantistoj, kiuj nun aŭdus per sia radio-aparato, se la sveda radiostacio ne estus malpermesinta la dissendon de nia hodiaŭa programo. Vi certe konsentos, ke tiuj faktoj havas multe pli grandan valoron ol ĉiaj teoriaĵoj.

Cetere nur eksperimento, sperto povas meti finon al pure teoriaj diskutoj. Sekve, eksciu do, ke jam de 46 jaroj pli k pli ofte la eksperimento sukcese ripetiĝas ĉiutage, tra la tuta mondo.

Ni vivas en epoko, dum kiu la homo flugas per maŝinoj, aŭdas el malproksime per aparatoj ; en nemalproksima tempo oni ne nur povos aŭdi, sed vidi la foran kunparolanton. Tamen pri la ekzisteblo de tiuj teknikaj mirindaĵoj multaj homoj ne volis kredi antaŭ kelkaj dekoj da jaroj. Hodiaŭ la maljunuloj el inter la plej obstinaj nekredantoj devas konfesi al si, ke ili eraris.

Same okazos, rilate la problemon pri mondlingvo. Pli k pli cetere la nombro de skeptikuloj malgrandiĝas. Iel estus ofendi la svedan publikon, kies progresema spirito estas bone konata, se mi insistus pri tiu punkto per akumulado de pruvoj, ĉu teoriaj aŭ faktaj. Mi do limigos min per la facile pruvebla aserto, ke esperanto vivas, funkcias, senĉese pliriĉiĝas k elastiĝas per la uzado, ke ĝiaj progresoj en la vastiĝado, kvankam malrapidaj, estas tamen konstantaj k ke ĉiuj surogatoj naskiĝintaj poste fiaskas unu post aliaj, tial ke ili venas tro malfrue por solvi problemon jam kontentige solvitan.

Tial mi do simple transiros al la du ĉefaj punktoj de mia parolado, nome :

1) Kial laboristoj k avangardaj esperantistoj aparte kongresas ?

2) Kiajn avantaĝojn la proletaro povas trovi en la ĝenerala tutmonda aplikado de esperanto ?

Necesas ja diri, ke ĵus finiĝis en Kolonjo la XXV-a tiel nomita neŭtrala Universala Kongreso de esperanto, dum ni kolektiĝis ĉi tien.

En la fruaj tempoj de la esperanta movado, kiam temis ĉefe montri al la skeptika publiko, ke lingvo artefarita povas funkcii ; kiam la nombro da esperantistoj estis tre malgranda, tiam estis memkompreneble, ke la intereso de tiuj unuaj pioniroj postulis malatenton inter klasoj k inter opinioj. Burĝoj k proletoj, katolikoj k framasonoj, reakciuloj k revoluciuloj estis ligitaj per unu sama komuna ideo k deziro, nome konigi al la mondo la mirindan kreaĵon de d-ro Ludoviko Zamenhof. Cetere la aŭtoro de esperanto estis tiom altspirita homo ; el lia modesta persono elradiis tia unuiga forto, ke harmonio povis regi dum la universalaj kongresoj inter homoj plej diversaj laŭ deveno, kulturo k opinioj. Sed laŭgrade kiel vastiĝis la movado, kiam ĝi penetris pli k pli en laboristajn rondojn, tiam neeviteble devis elmontriĝi la klasaj antagonismoj.

Dum la lasta mondmilito esperanto estis metata en la servon de nacieca propagando. Esperantaj organizoj en Germanio k Francio uzis nian lingvon por diskonigi dokumentojn k propagandilojn, favorajn al sia respektiva nacio. Tio kompreneble devis havi kiel sekvon, ke internaciistoj ne plu emis renkontiĝi en sama kongreso kun ŝovinistoj ; same la laboristoj, kiuj estas nemalofte persekutataj de sia propra registaro, ankaŭ ne plu povis silente aŭskulti la flatajn k malsincerajn vortojn, kiujn kutime eldiras la gvidantoj de la neŭtrala movado al la registaroj, kies gastoj ili estas. Ĉu, ekzemple, niaj komunistaj k socialistaj K-doj povus nunjare kokgresi en Kolonjo k neŭtrale rilati kun reprezentantoj aŭ laŭdantoj de la Hitlera barbareco ? Tio estas neebla. Tia neŭtralo estus tute kontraŭnatura k mi sekve deklaras, ke la XXVa k.a. tiaj kongresoj havas nenian rajton, nenian pravon en sia pretendo reprezenti la tutan esperantistaron...

Antaŭ dek tri jaroj aŭdiĝis la krio : « For la neŭtralismon ! » k ĝi trovis larĝan resonon en la laboristaj esperantaj rondoj. De tiam nia movado iras laŭ sia propra vojo, kvankam ĉiuj esperantistoj uzas la saman esperanton. Jen do kial nunjare ni estas la gastoj de la demokratie regata ĉefurbo de Svedio, dum la neŭtraluloj honoris Hitlerion per sia ĉeesto en Kolonjo...

La laborista esperantismo pruvis eksperimente, ke ĝi estas natura k tute vivkapabla entrepreno; sed oni komprenu min bone: tia apartiĝo neniel signifas niaflanke deziron, ke esperanto ne prosperu en burĝaj k eĉ faŝistaj rondoj. Male, kun maliceta kontento ni ĝojas, kiam ni tion konstatas. Ni havas la firman konvinkon, ke la artefarita lingvo portas ion en si revoluciecan. Tiun « ion » Zamenhof malprecize nomis « interna ideo de esperanto », k estas fakto, ke tiu pli malpli nebula koncepto pri la signifo de tutmonda lingvo forte ligis k subtenis la unuajn pionirojn de la esperanta movado; tiu idea ligilo estas eĉ unu el la kaŭzoj de la sukceso de esperanto super konkurencaj projektoj.

Ĉio, kio helpas faligi la murojn inter la popoloj, estas ja en si mem revolucieca. Estus tute utopie prezenti al si mondon, sur kiu regus socialismo, t.e. paco, libero, foresto de ĉia ekspluatado k en kiu mankus la modernaj komunikiloj k produktiloj. Sekve sur la teknika kampo eĉ faŝistoj povas senkonscie labori al la detruo super tio, kion ili glorigas k deziras pluigi. Al tiaj homoj bone aplikiĝas la penso de la antikva greka poeto:

« *Kiujn volas Jupitero pereigi, tiujn li malsaĝigas.* »

La apartiĝo inter la laborista k burĝa movadoj okazis en Prago dum la jaro 1921. De tiu tempo ĉiujare k sen interrompo *Sennacieca Asocio Tutmonda* flirtigis sian standardon en iu grandurbo el Eŭropo: kvarfoje en Germanio, po unu fojo en Belgio, Aŭstrio, Sovetio, Francio, Britio, Nederlando k estas jam la dua fojo, ke Svedio gastigas nin: en 1928 ni ja kongresis en Gotenburgo kun la partopreno de K-doj el Sovetio k eĉ unu el Afriko.

Kiel tio estas ebla? vi certe demandos, kiam vi ekscios, ke nia organizo en la plej prospera tempo havis nur 7.000 membrojn. Tio estas tiom pli miriga, ke la SAT-anoj estas ĉiuj neriĉaj homoj, eĉ multaj estas malriĉaj, senlaboraj, tiom pli ke en Italio jam delonge nia Asocio estas malpermesita, ke en Sovetio antaŭ tri jaroj trafis ĝin la sama sorto, k ke en aliaj diktatorecaj landoj ĝi renkontas multajn barojn k malhelpojn. Tamen malgraŭ ĉio ni sukcesis venigi en ĉi tiun belan urbon el la Nordo 599 K-dojn el 15 landoj. Trude ja staras la demando: kiel tio estas ebla?

Pli faciligos la respondon, se mi tuj konigas al vi la fakton, ke, ekzemple, 5 K-doj venis el Parizo bicikle k unu el Hispanio samrimede. Dum la tuta jaro ili ŝparegis kun la celo akiri la necesan monon por libertempe vojaĝi al la SAT-Kongreso, Ĉiun jaron okazas tiaj faktoj, k ili klarigas la miraklon, ke Asocio havanta nur kelkajn milojn da anoj povas tamen okazigi ĉiujare kongreson, same imponan, kiel tiuj de organizoj kun milionoj da membroj. La forto de nia movado kuŝas en tio, ke la SAT-anoj forte konscias, ke ili estas pioniroj de nova, granda ideo, kiu pli malpli frue konkeros la mondon.

La nombro da anoj cetere ne ĉiam estas por organizo sufiĉa pruvo pri ĝia efektiva forto. La lastatempaj okazintaĵoj en Germanio bedaŭrinde montras tion tre klare...

(Daŭrigota.)

Granda sukceso de la XIII-a SAT-Kongreso en Stokholmo

599 partoprenantoj el 15 landoj

Brila, plensukcesa, neatendite impona estis la XIII-a en la sveda ĉefurbo. Aliĝis al la kongreso sume 642 personoj (361 membroj, 281 gastoj). Efektive partoprenis:

	SAT-anoj	*Gastoj*	*Sume*
Svedio	227	243	470
Holando	52	9	61
Germanio	12	4	16
Francio	6	1	7
Norvegio	8	1	9
Aŭstrio	6	4	10
Britio	4	1	5
Danio	7	—	7
Ĉeĥoslovakio	3	—	3
Estonio	1	2	3
Hungario	—	2	2
Svisio	1	1	2
Hispanio	1	—	1
Finlando	1	1	2
Polio	—	1	1
Sume: 16 landoj	329	270	599

La kongreso estis solene malfermata en la koncerta domo. Tiuokaze paroladis la sveda ministro por klerigaj aferoj, Arturo Engberg, en senco favora por nia afero k samvespere K-do Lanti faris longan paroladon, kies unuan parton vi trovas fruntpaĝe. La 7-an de aŭg. la kongresanaro estis akceptata en la urbdomo k salutata de la unua prezidanto de la urbkonsilantaro, Knut Tengdahl. (Liajn parolojn trovu ĉi-sube.)

La kunsidoj okazis en vere kamaradeca spiritostato. La kandidateco de *Parizo* kiel urbo por la nova Plenum-Komitato estis akceptata, same *Valencia* (Hispanio) kiel urbo por la 14-a Kongreso, laŭ invito de tieaj SAT-anoj.

En la fino estis *unuanime* akceptata Rezolucio, esprimanta fidon al la ĝisnuna organizformo de SAT k deziron pri ĝia konservo.

Salutparoloj de K. Tengdahl, urbkonsilantara prezidanto de Stokholmo

Mi petas vin bonvoli akcepti en la nomo de la urbo ĉi-tie la bonvensalutojn. Jam komence mi devas konfesi, ke kaŭzis al mi klopodojn klarigi al mi, pri kio temas, kiam oni venis al mi por paroli pri tiu ĉi akcepto. Fine tamen mi ekkomprenis, ke ekzistas speciala laborista esperanto-movado k aparta por aliaj civitanoj k ke tiuj aliaj, kies kongreso havas pli altan numeron, venos nur venontjare. La fendiĝo inter tiuj popolmovadoj certe havas kaŭzojn, kiuj estas pli fortaj eksterlande ol ĉe ni. Ĉiuokaze ja estas komprenebla afero, ke la laboristoj, kiuj ofte ne havas okazon lerni alian lingvon krom la gepatra, pli profunde sentas la malfacilaĵojn en la interrilatoj kun personoj el aliaj nacioj dum nunaj cirkonstancoj, k ke ili tial kun ĝojo akceptas la eblon povi lerni facilan internacian helplingvon. Per ĝia helpo ili preteriras la malfacilaĵojn, kiujn prezentas la grandaj kulturlingvoj, el kiuj certe neniu iam havos eblon iĝi la sole reganta, eĉ se multaj tion deziras. La laboro, kiun laboristoj en nia lando faras, nesciantaj la grandajn lingvojn, estas tiom pli respektinda, ĉar al ili mankas — kompare kun la edukitaj homoj, — la scio pri la radikoj el la grandaj lingvoj, kiuj enestas en la helplingvo. Tion tamen pli elokvente ol mi povas fari, esprimis la ministro por klerigo k instruo Artur Engberg hieraŭ dum la malferma soleno, k kies vidpunktojn pri tiu temo mi tute substrekas.

Mi vizitis la malgrandan ekspozicion de literaturo ktp, kiun aranĝis la kongreso, k mi devas diri, ke mi estis surprizita pri la multo, kion oni jam sukcesis fari por la disvastigado de la helplingva ideo, k kiajn bonajn rezultojn oni atingis per la uzado de helplingvo, ekzemple korespondante inter samfakuloj. Tia movado ne povas esti bazita sur malfirma grundo, eĉ se la vojo por pli ĝenerala akcepto eventuale montros sin pli longa ol la plej optimistaj inter vi imagas al si....

La antaŭkongreso en Malmo ankaŭ estis bonega sukceso. 25 eksterlandanoj el 7 landoj renkontiĝis kun K-doj el la tuta provinco. Sume ni nombris 300 esp-istojn. La popolparko, kie okazis la aranĝo, estis riĉe ornamita pre ruĝaj k esp-aj flagoj. Proks. 1000 personoj ĉeestis la propagandan kunvenon. Malferme salut-parolis la prezidanto de la laborista komuno, reprezentanta 30 mil organizitajn laboristojn el Malmő. Esp. kanthoro prezentis bonajn kantojn. Parolis K-doj el div. landoj, k precipe K-do *Lanti*, kiu pritaktis la temon : *Novaj formoj de organizado*. Granda entuziasmo regis la publikon. Kaj la publikan kunvenon finis *La Internacio*.

Poste la esp-istoj kolektiĝis en la restoracio, kie K-do *Lanti* parolis pri sennaciismo. Liaj diroj vekis ĉe multaj intereson por SAT, k oni povas antaŭvidi aran aliĝon de ĝis nun indiferentaj K-doj.

Dum la tagoj antaŭe la urbo estis karakterizata de esp-ista kosmopolitismo. Multaj eksterlandanoj jam alvenis frue k ĉiun vesperon okazis kunvenoj. La ĵurnalo « Arbetet » aperigis fruntpaĝe intervjuojn kun K-doj Lanti, Sulski k Veen. Ankaŭ en la burĝa gazetaro aperis notoj[1]. La 4-an de aŭg. vespere karavano de ĉ. 50 Gek-doj envagoniĝis por veturi Stokholmon. Samnombra aro ĉeestis la foriron. En la momento de l'ekiro eksonegis *La Internacio*, k oni konsciiĝis emocie pri la forto de sennacieca solidaro.

E. Norman (13.132).

TRA LA ESPERANTA GAZETARO

Retrovita unueco ?

Optimisma artikolo de *E. Privat* en la julia n-ro de « Esperanto » pri la reunuiĝo de l' neŭtralisma esperanto-movado. « ... Laŭ la nova projekto UEA fariĝas la tutmonda organizo de la movado k la naciaj societoj povos aliĝi... kun sia tuta membraro per kontraktoj... Ni volas esperi, ke la solvo sukcesos alporti al esp-o veran helpon k antaŭenpuŝon k ke oni ne perdos pluan jaron per diskutado de regularoj. Tiu malsano infaneca devos malaperi, se nia movado volas progresi pli grandskale. Politikado k partia spirito estas aferoj tro multekostaj por ni. Esp-istaj gvidantoj ne havas la rimedojn samtempe polemiki k disvastigi la uzadon de nia lingvo... » Se okazos tiel, se la « neŭtraluloj » kuniĝos en komuna organizo, nu, gratulindaj ili estas pro la servo farita al esp-o. Ni demandas : kiam agos kun sama saĝo la laboristaj esperantistoj ? Kiam ili retrovos sian unuecon grupiĝante ĉirkaŭ sia tutmonda organizo SAT ? Kiam kelkiuj ĉesos finfine trovi plezuron en la plua dissplitiĝo de la fortoj ?...

Pretaj akcepti la kongresontojn .

En « Svenska Arbetar-Esperantisten » (julio) K-do E. Eriksson klarigas en granda svedlingva fruntartikolo la rolon k la historion de SAT k Joĉjo adresas bonvenon al la kongresanoj. Resumante la nunan situacion li skribas i.a. : « ... urĝas ke ni laboregu en la landoj, kie oni ankoraŭ povas labori k speciale Nederlando montris bonegan volon al sanigo de nia SAT-organizo. Ilian modelecon devas montri ni ĉiuj en aliaj landoj, nur tiamaniere ni savos SAT de pereo. Ankoraŭ ne la svedoj ekhavis la percepton pri la utilo de nia mondorganizo, sed kiam oni komprenos ĝin, certe oni aniĝos pli multe ol ĝis nun... « Al la aŭstraj sampartianoj J. Johansson direktas severajn vortojn pro la fondo de ISE : « Tiu dato (la 4-a de junio, fondo de ISE en Vieno) enskribiĝis en mia memoro kiel hontinda tago, ĉar mi neniel povus imagi al mi, ke la socialistoj de Aŭstrio, de kiuj ni svedoj lernis tiom pri socialismo, ĝis tia grado perdis sian prudenton, ke ili volis entrepreni kontraŭorganizon de la jam ekzistanta internacia lab. esperantista SAT-organizo. »

La lingvosperto de Zamenhof.

En la junia kajero de « Literatura Mondo » troviĝas interesa artikolo (de H. J. Plehn) pri la lingvoscio de Zamenhof. Kiuj legas la tradukojn de Zamenhof — k malpravaj estus tiuj, kiuj ne legus k studus ilin ! — ekscios kun intereso, ke Z. nomis la rusan sia gepatra lingvo ; sed la polan li poste uzis pli ofte ol la rusan. La germanan li preskaŭ plene posedis (el ĝi estas multaj tradukoj). Tiun lingvon li ankaŭ bezonis helpe por traduki « Hamleto »n el la angla. Same estas tradukitaj de li *pere de la germana lingvo* la Fabeloj de Andersen (la originalo estas dana). Ankaŭ en la franca lingvo Z. atingis suficân perfekton, k tre lerte li tradukis el la hebrea.

(Daŭrigota.)

[1] Saman interesiĝon montris la Stokholma gazetaro. — *Red.*

El niaj Leteroj

...« Nia Bulteno »[1] estas malpermesata inter la neŭtraluloj en Los Angeles. Ĉe ilia lasta monata kunveno la prezidanto malpermesis ĝian disdonon inter la 26 ĉeestantoj. Li diris :

« ... Nia religio estas esperanto... Estas tre danĝera afero, ke ni havu alian ideon ol esperanto. Ĉiuj esperas iri en la ĉielon. Nia maniero estas esperanto nure, sole, — al la ĉielo... »

Li ankaŭ asertis, ke internaciismo malhelpas al la enkonduko de esp-o en la lernejoj. La saĝajn vortojn de lia moŝto mi konigas tra la mondo. Sinjoro G. R. Thomson fariĝos alia « famulo ».

(16.285).

Kara redakcio. Mi kredas, ke mi parolas nome de la plej multaj Federacianoj, kiam mi dankegas vin pro viaj tutkoraj bonvenvortoj. Tia bonvenigo sentigas nin esti hejme en la tutmonda esp. movado ; precipe la novuloj kiel mi. — Mi esperas, ke ni havos multan plezuron per ĝi. Se la tempo pliboniĝos, mi kredas, ke multe da membroj aliĝos al SAT, ĉar tiam oni partoprenas efektive al la tutmonda laborista esp. movado...

T. de Vries,
Sekcio III de FLE, Amsterdamo.

[1] Eldonaĵo de Lab. Esp. Grupo en Los Angeles.

LA AŬGUSTA NUMERO
DE
SENNACIECA REVUO
enhavas inter alia interesa k leginda materialo, — raportoj, literaturo, kritiko, — tre detalajn k multflankajn informojn pri la situacio en Germanio.

Prezo de la kajero : fr. fr. 2.50.
Jarabono : 25 fr.

SAT, 23, rue Boyer, Paris, 20e

Kiel pagi al SAT ?

Malgraŭ la teknikaj progresoj en nia epoko la homoj pli k pli malfaciligas al si la interrilatojn ! Protektaj doganoj, malpermesoj eksterlandigi monsumojn eĉ plej malgrandajn, resume : ĉiuspecaj ĉikanoj por plimalfaciligi materie k morale la internacian proksimiĝon, karakterizas la nunan periodon de seninterrompaj krizoj.

SAT tamen bezonas enspezi el ĉie por povi pagi siajn elspezojn ! Por plifaciligi la pagojn, ni instalis *poŝtĉekajn kontojn* je la nomo de la *Asocio*. Sed ne ĉie eblas k ni havis malsukceson rilate al *Polio* k *Ĉeĥoslovakio* (kie ni antaŭe havis tiajn kontojn).

Ni nun rekomendas pagi : *a)* kie eblas, al la poŝtĉekaj kontoj (eblas ekz. en Germanio pagi al nia nova Leipzig-a konto n-o 85.148) ; *b)* per poŝta mandato aŭ per bankĉeko en bonvaluta mono aŭ per bankbiletoj bonvalutaj en rekomendita letero ; *ĉ)* per niaj ĉef-perantoj (landaj) :K - doj *J. Minke* Amsterdam (por Nederl.), *Sulski*, Luton (por Britio), *Eriksson*, Stokholmo (por Svedio), *Pelcman*, Plzen (por Ĉeĥoslovakio), *Literatura Mondo*, Bleier (por Hungario), K-dino *Brumer*, Attnang (por Aŭstrio).

Tiu lasta metodo estas tre ŝpariga por la K-doj enlandaj. Tamen, kie funkcias niaj poŝtĉekaj kontoj, la procedo ankaŭ estas plej simpla k malmultekosta. Formularon poŝtĉekan oni petu ĉe ajna poŝtoficejo, plenigu ĝin laŭ la surpresitaj indikoj (nomo de ricevonto, kontunumero, ktp) k notu en la parto destinita por SAT (la ricevonto) dorsflanke telegramstile, sed *precize* pri la celo de la pago (kotizo, abono, libromendo ks). Tiel *malnecesas* skribi aparte leteron aŭ karton. Same ĉe pagoj per poŝta mandato (En tiu okazo nur la afrank-elspezoj por la paganto estas pli altaj).

Ĉe mendo de libroj ne el la propra eldonejo ne forgesu alkalkuli 10 % por la afranko !

Administracio.

DISKUTEJO

Pro tio ke la artikoloj ĉi-sube pridiskutataj aperis en « S-ulo », (n-roj 403, 404 *k* 405*), la sekvanta traktaĵo trovas lokon ĉi tie.*

Red.

Redire al epilogoj

K-do epiloganto, malgraŭ via promeso fari vian « cigno-kanton » plezuriga legaĵo, mi sentas, ke vi plene malsukcesis. Viaj epilogaj diradoj tedas. Tedas, pro tio, ke ripetiĝas tra ili la penso : « marksistoj » estas bando el malsaĝuloj k malspritaj religianoj. Kompreneble, tiel krude

la penso nenie estas esprimata, sed tiom pli forte efikas via subtila moketado kun la tute legitima celo averti kontraŭ dogmiĝo ; efikas por krei la penson : « La marksismo devas morti ». Nutri tian penson estas faro, pri kiu Hitler povas ĝoji elkore, sed la laboristoj nur povas aŭ funebri aŭ naŭzite forturni sin.

Vi rakontis anekdoton. Profesoro pri marksismo atestis al la pseŭdonima « Sennaciulo », ke certe « li estas marksisto ». Ĉu eble « sennaciulo » sentis ekstreman flaton en tio, aŭ ĉu la motivo por rakonti tion estis la intenco malarmi eventualajn « marksreligianojn » per la starigo de timigilo kun surskribo : Jen, aŭtoritato ! Sed kredeble, sennaciulo ne estas flatebla per tio, ĉar ĝenerale li malkovras tiom da mankoj en la marksismo, ke mi miras, ĉu restas ankoraŭ io valora, krom la klara elmontro « kiel okazas la ekspluatoprocezo de la kapitalo super la laboro ». Cetere, eĉ tio estas nur « flanke afero ». Ĉefaferon Marks ne taksis sufiĉe alta : la psikologiajn faktorojn. Jen, manko, manko nenio alia ol manko ! — Nu, jes ; ĉiuokaze sennaciulo kvazaŭ intuicie, sen mem ekkoni tion, elparolis marksistan principon en sia « For la Neŭtralismon ». Li pro tio estis nominda « Marksisto ». Li ja alvokis la lab. esp-istojn apartiĝi, foriĝi el la burĝa medio, organiziĝi laŭklase k servi al la klasaj interesoj de la tutmonda proletaro. Pro tio profesoro pri marksismo nomis lin marksisto tute prave. Estas granda merito de sennaciulo esti farinta tion.

... Tamen unu sola marksista elkrio ne sufiĉas por montri vojon al la venko de l' proletaro. Proverbo diras : unu hirundo ne faras someron...

La problemo estas : ĉu la marksismo — la scienco pri socialismo — estas ĉionsufiĉa por gvidsigni la vojon al la liberiĝo de la proletaro ? Socialismo estas scienco — ĝi estas LA prisocia scienco. Ĉiuj aliaj socipolitikaj sistemproponoj estas fantaziaj elpensaĵoj. La scienco pri socialismo montris al la sovetia proletaro, ĉefe per Lenin, la vojon al ĝia emancipiĝo, mi diru ĉi-tie aldone. Scienco estas kono reduktita al leĝo k enkorpigita en sistemo. La fundamenta leĝo, sur kiu la socialismo baziĝas estas la leĝo pri valoro, kies formulo estas : La valoro de varo estas determinita de la socie necesa labortempo enkorpigita en ĝi. Laborforto, la sola varo, kiun la laboristo posedas k devas vendi por vivadi, estas determinita en la sama maniero. Tio sekvigas la amasiĝon de riĉaĵoj en la manoj de la poseda klaso, k plilarĝiĝon de l'proletaro, tiom longe kiom abundego da produktoj, konsumeblaĵoj, ekzistas, kiujn la lab. klaso ne povas konsumi — malgraŭ ke ĝi malsatas kiel klaso — ĉar la nuna socio baziĝas sur la privatposedo de produktiloj k produktaĵoj. Tiu ĉi stato per si mem implicas la REVOLUCION.

Tamen tiu ĉi revolucio ne estas fatala. Marksismo neniel instruis aŭ instruas fatalismon, sed kontraŭe ĝi instruas, ke « la proleta movado estas la MEMKONSCIA, sendependa movado de l' grandega plimulto en la intereso de l' grandega plimulto ». Memkonscia implicas scikoni sian pensadon, implicas, ke sur la ŝultroj de la proletaro restas la tasko sin liberigi. Kaj tio signifas, ke Marks alte taksis la « psikologiajn faktorojn ». La Historia Materialismo (k la klasbatalo) klarigas al ni la politikan k intelektan historion de epoko k metas en niajn manojn klarigilon. Per ĝi ni povas, — se ni nur estas veraj al la scienco mem — kompreni k komprenigi la nuntempajn problemojn, eventuale eĉ sen meti la nazon en la verkojn de Marks. La malsanulo — nur la kapitalismo estas malsana — eĉ se ĝi scias, nek povas, nek emas apliki la recepton. La proletaro estas la kuracisto. Se io malsanas ie, do tio, ke la kuracisto ne lernis sufiĉe la arton kuraci. Krom tio troviĝas en la prisocia kuracarto multe pli da ĉarlatanoj ol en iu ajn alia kampo.

En la lab. esp. movado estas laŭdegata esp-o kiel ekstermilo de naciismo k ĝenerale ĉiontaŭga kuracilo. Per tio la prolet-esp-istoj faras malbonan servon al la tutmonda proletaro. Tion mi diras, malgraŭ tio, aŭ pli bone, pro tio, ke mi estas fidela esperantano k konsideras esp-on grandega trezoro. Certe, mi deziras vidi esp-on kiel universalan lingvon ne apud aliaj, sed sen iu alia « nacia » lingvo. Tamen deziro ne ŝanĝos realajn faktojn. Multaj faktoroj devas kunefiki por atingi homaran unulingvecon. Unu el la faktoroj, la ĉefa antaŭkondiĉo, estas starigo de l' socialismo. Eĉ burĝaj ekonomiistoj konsentas, ke la monda malsano konsistas en « la malordo inter produktado k konsumado » la sola kuracilo por forigi tiun malordon estas produktadi por foruzadi — ne kiel nun vendadi profite al la kap. klaso. Kie enpaŝas en tiu ĉi problemo esp-o ? Ĉar la proletaro estas la kuracisto k la emancipiĝo de la la lab. klaso okazas lando post lando — la proletaro de ĉiu lando devas fini unue kun sia propra burĝaro — (Voroŝilov prave ne mobilizis, la germanaj proletoj eĉ ne scius lin danki) ĝuste tial esp-o fariĝas gravega helpilo, sen kiu ĝi estas almenaŭ duonkripla. (La Hitler-reĝimo ekz. tre dolore spertis la mankon de ĉia lingvoscio, kiel la gazetoj tre detale elmontris.)

Nek alpreno de esp-o, nek ĝisradika detruo al naciismo helpos al la proletaro atingi sian venkon, sed sole la ellerno de la kuracarto : Marksismo !

Kia tipo de marksismo ? Ekzistas ja deko da « skoloj ». Tio rememorigas anekdoton pri pastro, kiu baptonomis kuniklon karpo por ĝin manĝi dum sankta vendredo. Tamen kuniklo ne fariĝas karpo, k kaŭtskiismo aŭ bernŝtajnismo ne fariĝas marksismo. Marksismo nur estas tio, kio estas en harmonia akordo kun ĝiaj centraj principoj. Tra la tuta mondo kuniĝas ĉiuj potencoj por sankta pelĉaso kontraŭ la marksismo. La devizo « la marksismo devas morti » (diskriata tie, kie ĝi fakte nur vegetaĉis) efektive nur reliefigas ĝian senmortecon k kriegas en la orelojn de l' proletaro : Jen, via liberigilo ! Senantaŭjuĝa esplorado kondiĉas komparadon de trovitaj faktoj kun la jam establita scio. Se ni ne bezonus fari tion, tiam ni povus helpi al Hitler forbruligi librojn. Ni bezonas klarigilojn, kiel ni bezonas mezurilojn. Sur paĝo 54 de « Naciismo » eĉ K-do epiloganto proponas tian mezurilon k sen ĝi « ŝajnas al ni neeble kompreni k klarigi la historian evoluadon » ! Ne demandi sin unue, ĉu ĉi tio aŭ tio konformas aŭ ne kun tiu ĉi klarigilo signifas malebligi « kompreni k klarigi la historian evoluadon », laŭ viaj propraj vortoj. Malatenti, ne konsulti la laborojn de niaj antaŭuloj estas malsaĝe. Estas bone meti la nazon en la librojn, almenaŭ pli bone ol senzorge ekfantazii. Estas senutile fari « eltrovojn » malatente al antaŭaj trovoj, se tiuj ĉi novaj « eltrovoj » jam pruviĝis eraroj. Kial vi traserĉis kun formika diligento la verkon de Fustel de Kulanĵ, sed ne la verkon de Ljŭis H. Morgan ? Nur por malatenti k pense eviti la eblan konformecon kun iu ajn establita « doktrino » ? Ĉu vi devis eviti la serĉadon en « La Antikva Socio » de Morgan k « La deveno de la familio » de F. Engels por senĝene elkovi apartan doktrinon ?

Mi ne estus demandinta, se ne pruviĝus per la demando, ke via moketado pri la kutimo de marksistoj citi el Marks aŭ serĉi pri ebla respondo ĉe Marks, estas misgvida. Kion vi mem faras en nemarksanaj verkoj, kial estas tio kondamninda ĉe aliaj ? Krom tio, se vi ne tute ignorus « marksanajn » verkojn, tiam vi ne bezonus refuti la jam refutitan ideon « ke tiu hejma religio naskigis la propraĵrajton ». Laŭ germana proverbo tio signifis « revarmigi malno-

Radio-programo

27.8: 21.30-21.50 Minsk, 1105 m *(Same:* 1., 3., 5., 7., 9. 9.).
28.8: 19.30-20.00 Ljubljana, 576 m, parolado *(Same:* 4. 9.).

vegan kamomilan teon ». Morgan ne nur refutis tion, sed ankaŭ ne lasis dubon, ĉu en la pratempo « jam ekzistis la triunuo : patro, patrino, infano, kiu plilarĝiĝinte formis klanon ». Firme vi certigas, ke « tiuj demandoj restas ĝis nun nerespondeblaj per nerefuteblaj argumentoj ». Vi povas pledi nescion pri tiuj ĉi verkoj, sed tio nur pruvas, ke « starigante socipolitikan demandon estas » SENRESPONDECE NE » traserĉi en la verkoj » de « socipolitika » enhavo. Kiam vi skribis panegirojn plenajn de idealismo via partia membrokarto tamen ne faris vin bolŝeviko. Vi mem ne nomas membrokartoportanton SAT-ano. (vd. Jarlibron 1929-30, p. 8.) Krom tio, ŝajnas al mi, viaj sampartianoj malaprobis la idealismon predikitan de SAT-propagandiloj. Almenaŭ SEU kondamnis fruege tiun idealismon. Se oni forgesas ĉion ĉi, via argumento ŝajnas raciega.

Kiam alia transprenos la gvidilon de SAT, estas esperinde, ke personaj plaĉoj k malplaĉoj ludadu plej malgrandan rolon. La propagandiloj de SAT devigis neniun aprobi la idealismon. Ili ne estis artikoloj de la statuto. La statuto ankaŭ neniun devigis ĵuri fidelon al la marksismo, sed estas nenio en ĝi deviga al iniciato de persekutmanio kontraŭ la marksismo, male, estas argumenteble, ke ĝi implicas ties aktivan akceladon.

Tiuj, kiuj faras senvivajn parkeraĵojn el la instruoj de Marks, certe meritas primokon, sed kion meritas tiu, kiu sub ĝenerala tono de laŭdo (« genia aŭtoro ») kiel diligenta k lerta talpo subfosas la montegon el fido, kiu plenigas la menson de l' mondproletaro por la verko de Marks?

T. Veder.

K-do Veder metis min en grandan embarason : li diras, ke miaj epilogoj estas *tedaj* k anstataŭ oscede formeti la legaĵon, aŭ simple turni la paĝon, li pasie ekkaptas la plumon k verkas 5-paĝan rebaton !... Kutime tedaj legaĵoj ne havas tian efikon. Tial mi forte emas kredi, ke K-do V. estis pli incitata ol tedata. Cetere la letero, kiu akompanis la artikolon, pruvas tion tre bone. La legantoj juĝu mem :

« Mi ne emas kredi, ke vi intencas transdoni « S-ulo »n k SAT ' liberaj de ĉia marksista influo ', aŭ oni ja devus supozi, ke vi alianciĝis kun la Hitler-bando. Ĉiuokaze viaj epilogoj kreas fortege tiun ĉi impreson. »

La konstato pri tia spiritostato ĉe homo, kies sincero estas nedubinda, plej bone pruvas, ke mi ne kontraŭbatalis iluzion : *fanatiko ekzistas eĉ ĉe malnovaj SAT-anoj*. Kaj tiagrade, ke K-do V. eĉ ne plu povas ĝuste kompreni la parolon de tiu, kiu ne sufiĉe humile riverencas antaŭ lia kredo. Mi citu ekzemplon : Estas dirite en mia artikolo : « Starigante socipolitikan demandon, neniam mi ekhavas la penson traserĉi en la verkoj de Marks por trovi respondon. »

El tiu frazo K-do V. konkludas, ke mi preferas traserĉi en burĝaj libroj.» Tamen estas klara la signifo de mia frazo, se oni legas tiun, kiu tuj sekvas : « Mi havas la konvinkon, ke neniu el la plej kompetentaj komentistoj de Marks povas prave havi la pretendon scii, kiuj estus la pensoj, la sinteno de ilia majstro antaŭ *nuntempaj* problemoj. » Evidente ne temas pri historiaj demandoj, sed pri la *ĉiutagaj problemoj*, kiuj stariĝas antaŭ la laboristaro. Ĉio cetera en la rebato de K-do V. estas tiel same. Tial mi ne volas misuzi pli da spaco en la gazeto por senutila diskuto. Sed, se la SAT-organoj restos, kiel ili ĉiam estis ĝis nun, malfermaj al *ĉiuj* tendencoj, mi ne promesas, ke neniam plu mi « tedos » la fanatikemon de tiuj, kiuj havas la naivan kredon, ke Marks neniam eraris, ne povis erari, ĉar li fariĝis ilia dio. Kompreneble Marks mem hontus havi tiajn disĉiplojn.

Pri la sama temo mi ricevis de G. Savil, redaktoro de « Esperanto-Lando » artikolon kun la titolo : *Kiu estas vera marksisto.* Inter la « veraj » li mencias Stalin k Trocki. Nu, bone, sed G. S. ne klarigis, kial ĉi tiu lasta estas konsiderata de la unua kiel « kontraŭrevoluciulo » k pro tio forpelita el Sovetio...

Inter la « malveraj » estas nomitaj, ekzemple, Vandervelde. Kaj tio signifas, laŭ la vidpunkto de G. S., ke la socialistaj K-doj, kiuj aprobas k admiras la prezidanton de la II*a* Internacio, ne povus esti SAT-anoj. Sed G. S., kunlaboranto al neŭtrala gazeto, ne-SAT-ano, nek abonanto al niaj organoj, sendube opinias esti « vera marksisto ». Kaj plie li verŝajne opinias, ke K-do Veder ne estas tia ĉar antaŭ kelkaj jaroj ili ne povis interkonsenti pri la gvidado de la Nov-Jorka Lab. Esp. Grupo.

« Granda nubo, malgranda pluvo ».

E. L.

Por Ŝtopi la Breĉon

24. listo

13 607, Roosing-Zeist	gd.	1.—
Venditaj gazetoj en Roterdamo	»	1.50
D. Fernandez-Bilbao	fr. fr.	4.20
Amiko de la Sovetia proletaro	»	5.—
G.v.'t Veer, Assendelft		0.50 gd.
12 715, S. Otsen, A' dam		0.50 gd.

Ĉe la Junularo

Skolta neŭtralismo.

La internacia skolta movado nomas sin neŭtrala. En Danio oni tamen lastatempe havis tre bonan okazon por trarigardi la maskon, malantaŭ kiu sin kaŝas la plej burĝa k reakcia spirito ĉiam preta por helpi al kontraŭproletaj k naciaj elementoj. Post travivo de tiaj « neŭtralaj » agoj oni rajtas diri, ke vera neŭtralismo ne ekzistas, neniam ekzistis k tute ne estas ebla.

Temas pri malpermeso de la dana soc. dem. registaro kontraŭ la politikaj uniformoj. La kialo de la malpermeso estis la fiagoj de la nacisocialistoj ĉe la german-dana limo ; sed ĉiuj organizoj devis formeti la « ĉemizon », ĉu bruna, griza, blua aŭ nigra. Ankaŭ la skolta uniformo estis malpermesata. Granda, brua k incita protesto. Kial ? Ĉar skoltoj ja estas neŭtralaj.

Jen ekzemploj : Ĉiuj burĝaj — k nur burĝaj gazetoj defendis la rajton de la skoltoj porti uniformojn. En la organeto de la nacisocialista partieto dana (« Nationalsocialisten ») oni eĉ povis legi artikolon direktitan al la skoltoj. En ĝi oni malhonorigas, mokas k malpurigas la registaron pro la malpermeso k eĉ admonas skoltojn pli ol 18-jarajn tuj aligi sin al la nacisocialista partio k kunhelpi renverson al la marksista tiraneco ! La titolo de la artikolo estis : *La mumioj ankaŭ ŝtelis la skoltan uniformon. Skoltoj ! Membriĝu en la nac. soc. partio !*

Alifoje ĉe skolta jubileo oni invitis la gvidanton de la nacisoc. partio Lembke por fari la festparoladon. (La oficiala kialo estis, ke li fondis la skoltan movadon en Danio.) La granda gvidanto de la malgranda partio oratoris pri la *nacia* k *vira* deveno k la celoj de la skolta movado, poste pri la uniform-malpermeso, akcentante, ke tiaj estas la kondiĉoj en landoj, kie « ĉifonuloj » regas. Fine li konkludis laŭvorte : « *De hodiaŭ estos la devo de ĉiu knabo kunhelpi fortiri la ĉemizon de la parlamento !* » (Do senvualigi la parlamentajn trompistojn !).

Aliam oni uzas ne ĝenate la nomon, nombron k la « porsocie danĝeran laboron » de la socialistaj gejunular-k infan-organizoj. Per tia agitado oni fluigas pli riĉe la riveron de mono de la multaj monsubtenantoj. Fine nur estas menciinde, ke kompreneble estas bona kutimo neŭtrala havigi al si kiel gvidantojn k protektantojn nur la « plej altrangajn k potencajn en la lando ». Nobeloj, altrangaj oficiroj, monmagnatoj k konservativaj komercistoj kun reakciaj politikistoj, jes,

eĉ reĝaj personoj. La devizoj ja estas : *Al sia patrio oni ŝuldas ĉion kion oni povas fari.* Aŭ : *Dio, Reĝo, k Patrio.*

La tuta spirito, klerigo, propagando k labormaniero de la movado estas la imageble plej reakciaj. Vere oni havas bonan kialon krii kun la skoltoj : *Vivu neŭtralismo !*

*Paŭlo Thorsen (*18. 334*)*

Nikolao Skripnik

1872-1933

Antaŭ kelkaj tagoj finis sian vivon per memmortigo Nikolao Skripnik. Tiu K-do estis C. K.-ano de Tutsovetia k de Ukrainia kompartioj, plenumkomitatano de Komintern, vicprezidanto de Popola Komisariaro Ukrainia k prezidanto de Ukrainia Ŝtata Plana Komisiono.

Li komencis sian revolucian marksistan agadon en 1897. 36 jaroj de lia revolucia vivo estis seninterrompa batalo. Sesfoje li estis arestata de l'cara polico. Kelkfoje oni lin kondamnis al ekzilo Siberion, de kie li forkuradis eĉ ne atinginte la destinitan lokon. Tamen en la jaroj 1908-13 li devis ekzile restadi en Siberio (Jakutio). Post la Oktobra revolucio li estis okupanta laŭvice serion da gvidaj postenoj. Estante popola komisario por klerigo en Ukrainio, li en 1930 esprimis sian opinion pri esperanto. Ĉi tiun opinion ni kritike menciis en « S-ulo ». (Vd. n-on 309, p. 529 k n-on 400, p. 52). En oficiala partia jurnalo en la nekrologo interalie oni skribas :

« Sed la agado de K-do Skripnik, precipe dum la lastaj jaroj, ne estis libera de gravaj politikaj eraroj, kiuj ĉiam pli profundiĝis. Ĉi tiujn erarojn k malstreĉiĝon de bolŝevika singardo utiligis agentoj de la klasa malamiko, kontraŭrevoluciuloj, ŝovinismaj elementoj. K-do Skr. lasis sin ĉirkaŭi per la plej kruelaj malamikoj de la partio, kiuj lastatempe grandparte gvidis lian laboron, dislokigis homojn post lia dorso, movis lian plumon »... « Implikiĝinte en siaj rilatoj kun ukrainiaj burĝ-naciistaj elementoj, ne trovinte en si forton por elŝiriĝi el tiu ĉi araneaĵo, K-do Skr. mem iĝis viktimo de tiuj kontraŭrevoluciaj elementoj. » (« Komunisto », Ĥarkovo, 8. 7. 33).

Do, kiam en « S-ulo » ni nomis ŝovinisma la sintenon de K-do Skr. por esperanto, tio ja ne estis tia « herezaĵo », kiel ĝi ŝajnis al kelkiuj unuavide...

Grodnano.

En nia movado

HISPANIO. *Valencio.* La Grupo Lab. Esp-ista por celebri la 2-an datrevenon de sia fondiĝo organizis mezjulie « Semajnon de Esperanto », kiu estis granda sukceso. Ĉefpartoj en la programo estis : Intern. Ekspozicio de poŝtkartoj, libroj k gazetoj, valora materialo el pli ol 30 landoj. Disaŭdigo de popolaj internaciaj kantoj k muziko per gramofondiskoj. Ekskurso al belega lago en la provinco. Publika festo en teatro de lab. Ateneo la 14-an de julio, dato de la fondo. Membroj de la grupo ludis tre sukcese en esp-o la teatraĵeton « La Versaja Kaptito » k hispane « La lignovermo »n, tradukitan *el esp-o.* Dua parto : propagandaj paroladoj de K-doj Bilaruĥ-Barcelono (nome de hisp. LEA), Azorin-Kordobo, soc. deputito en la parlamento, Hernandez, prez. de la Valencia grupo k SAT-peranto, kiu resumis per trafaj vortoj la feston. Ĉeestis proks. 400 gelaboristoj. Tiu semajno inaŭguris larĝan agitadon en la tuta urbo, helpitan multe de senpagaj reklamoj en la urba gazetaro.

POLIO. *Lodz.* La 20.7. esp. lernintoj ĉe la pola junsocial. organizo TUR fondis esp-an sekcion, kies estraro konsistas el K-doj K. Lewandowski, L. Kujawiak k Cz. Jasiniak. Post la elektoj estis pridiskutata la konflikto inter Vienaj socialistoj (ISE) k SAT. La kunvenintoj (ĉiuj aktivaj social. junulargvidantoj, escepte la instruinto, K-do Gothelf) esprimis plej akran proteston kontraŭ la skismigantoj, kiuj anstataŭ labori por unuigi la prol. esp-istojn en kontraŭfaŝista batalo, laboras en mala direkto, k per tia malunuigo faras reakcian, nuntempe nepre kondamnindan laboron. Ĉe la fino estis decidite turni sin al la esp. sekcioj ĉe la Lodzaj societoj « Cukunft » (mald. socialista) k « Aŭroro » (senpartia klasbatala) pri fondo de loka Federacio. Samcelaj K-doj k organizoj helpu la novan sekcion per konsiloj, sendo de esp-aĵoj, statuto ks al : Lodzka Org. Ml. « TUR » Suwalska 1, *Lodz.*

Ekster nia Movado

La 25-an Universalan Esperanto-Kongreson en Kolonjo (Köln) partoprenis proks. 750 personoj (inter ili neniu slavo !). Sub la sonoj de la germ. nacia k de la naci-socialista himnoj (kiujn fine ankaŭ sekvis *La Espero*) okazis la solena « samdirektigo » (t.e. meto sub la kuratorecon de l'« nazi ») de la Germ. Esp. Asocio, kies prezidanto devige estas naci-socialisto. « Heroldo » de 6. aŭg. entenis *nenian sciigon* pri la kongres-okazintaĵoj !

S-ro Rolan (Rolland), deputito de la franca departemento Ron (Rhône), starigis esp. grupon ĉe la Ĉambro de Deputitoj de la parlamento. Aliĝis jam 41 parlamentanoj el diversaj partioj.

La regiona parlamento de la franca departemento *Malsupraj Alpoj* (Basses-Alpes) unuanime voĉdonis deziresprimon pri instruado de esp-o en la lernejoj ; la sama deziresprimo estis akceptita en la departemento *Ron-enfluejo* (Bouches-du-Rhône).

En la ĉefurbo de Madagaskaro, Tananarive, okazis lastatempe 9 kursoj kun 300 lernantoj. Novaj kursoj en Instituto por moderna instruado, Komerca lernejo k Instituto de sciencoj k artoj.

Al marist-esperantistoj

Kiom da knaboj k junuloj deziregas iĝi maristoj k kaptas la okazon de senlaboreco. Ili opinias trovi tion, kio al ili mankas. Mi memoras, kiel dum la milito oni adoris mariston k havigis ĉion al li. Sed hodiaŭ estas aliel. Kiam li malsaniĝas, li ĉiam restas nur... maristo. Pri la salajroj mi ne parolas, ĉar ekzistas laŭlande grandaj diferencoj. Nederlandaj maristoj perdis sinsekve dufoje 5 elcentojn de siaj salajroj. Oni ne komprenas, kiel la familianoj povas vivi, se oni scias pri la vivkostoj. Oni promesis, ke pro la malaltigo de la salajroj pli da maristoj akiros laboron ; mi ne povas nei tion, temas ĉefe pri ŝipoj, kiuj eksportas lignon el Sovetio. Sed neniam oni parolis pri neceso pliĝojigi la mizeran vivon de maristoj.

Serĉante distron en alilanda havenurbo, mi komprenis neceson legi, studi k ebligi ankaŭ lernadon de esperanto. Pluraj maristoj estas akiritaj por esp-o, sed ne ankoraŭ sufiĉe. Mi persiste propagandis k propagandas inter samsortanoj k studas kun ili dum vojaĝoj esp-on. La maristoj per siaj vojaĝoj ja povas esti plej bonaj propagandistoj por nia movado. K-doj maristoj k loĝantoj en proksimo de havenoj, zorgu pri esp. propagando inter maristoj ; akiru interligon, sciigu adresojn. Regulan internacian interligon la havenurbaj perantoj nepre bezonas ; ili ankaŭ prizorgadas gazetservon k utiligas sciigojn pri havenlaboristaj k ŝipanaj laborkonfliktoj.

Adresoj de perantoj : NEDERLANDO : S. Otsen, Barentzstr. 71, I, *Amsterdam* ; J. Vis, Zuiddijk 306, *Zaandam* ; J. v. d. Plas, Drentschestr. 24 a, *Rotterdam* ; P. G. v. d. Plank, Jac. Marisstr. 57 r, *Dordrecht* ; ANGLIO : J. W. Pretton, Wrightstr. 71 *Hull* ; BELGIO : Belga Marista Hejmo, Ankerrui 20, *Antverpeno* ; FRANCIO : Belaud, 24, rue St.-André, *Saint-Nazaire* ; LAS PALMAS (Kanariaj Insuloj) : A. Ll. Bellvehi, str. Pedro de Vera 9 ; SOVETIO : A. Erjuĥin, Marista Klubo, *Arĥangelsk* ; K-dino Lisiĉnik, Dvorec Truda, Majak Kommuni, *Sebastopol* ; Bazilo Belakov, Kollektivnaja 4, *Tuapse* (Kaŭkazo). *Eksŝipano.*

Valora libraro — Trezor' sen komparo ! Profundiĝu en nian literaturon ! Havigu al vi nian katalogon k mendu almenaŭ unu libron por subteni la SAT-eldonejon en krizotempo.

Memornoto

REPRESIS EL « SEN. REVUO » : *Le Réveil typographique,* Paris, n-o 14, pri sindikat. en Svedio.

REPRESIS EL « LA LERN. » : *Arbetaren,* Stokh., 17.6, esp-ista infano rakontas (kun bildo).

PRIESPER. ARTIK. K NOTOJN ENHAVIS : *De Fakkel,* Amsterd. (rubr.) 9., 16., 20.6., 4.,11., 18., 21.7. *Signalen,* Stokh., 8.6. (artik. de Lanti), 18., 22., 29.6., 6., 13., 20., 27.7., 3.8. *Fastighet Arbetaren,* Stokh., n-o 1, art. de K-do Lanti ; *Arbetaren,* Stokh., 27.6., 18., 19.7. *Le Jeune Proletaire,* Paris, n-o 1.

RAPORTIS PRI LA SAT-KONGRESO : *Arbetaren,* Stokh., 20., 29.6., 4., 5. 8.

NOTOJ PRI SAT : *Le Libertaire,* Paris, 9.6., *La Patrie Humaine,* Paris, 30.6., *Le Jeune Socialiste,* Tunis, jun.-jul. *Weekly People,* N. York, 1.7.

* * *

En la centra organo de l'socialdem. partio *svedia* « Social-Demokraten » aperis je 14. k 19.6. varb-artikoloj de K-do Lanti. La artikoloj estas represitaj en preskaŭ la tuta socialista k sindikata gazetaro de Svedio (en pli ol 30 gazetoj).

KORESPONDADO

Nederlando.

K-do *Chr. H. Heiner,* Anton Mauvestraat 5, *Huizum* (Tr.), dez. kor. kun ĉl Gek-doj pri ĉ.t. Resp. gar.

Du junuloj (18-21 j.) kor. kun Gek-doj ĉl. *H. W. Stuit,* Yselmondsche laan 108, *Kralingsche veer.*

K-do 27 j. dez. kor. kun eksterl. K-doj. Bonv. sendi L, PI ktp al *J. Schenkel,* Beetsstraat 181, *den Haag.*

Sovetio.

K-dino *F. Kestner,* Proletarskaja 58, *Voronej,* dez. kor. pĉt. kĉl. Interesiĝas pri korpokulturo k muziko.

Ŝparkasaj oficistoj kor. kolektive k individue pri fakaj temoj. Adr. : *Leningrad* 31, ul. 3 ijula 55, Sberkasa, 1874, red. « Sberknijka », por K-do *R. Dvorkin.*

Svedio.

Nia klubo aranĝos la 1. okt. letervesperon Gek-doj el ĉ.l. skribu al : « *Esp. Klubo La Espero* », *Bjuv.*

Originalan Poemaron

kun tre varia k leginda enhavo, verkilan de K-do EMBA, ni intencas eldoni. Ĝi estos 64-paĝa k belaspekta.

Ni petas ĉiujn literatur-amantojn

antaŭmendi kun antaŭpago *de*

fr. fr. 3.60 por simpla,

» » 5. - por luksa eldono.

Ni eldonos tuj post ricevo de sufiĉe da antaŭmendoj kun pago.

Direkcio de SAT.